Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 19-an de septembro 2024 per Zoom

**Ĉeestis** Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo.** La tagordo aprobiĝis.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 22-an de aŭgusto 2024**
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis post eta ŝanĝo.

**3. Norvega Esperantisto kaj la Nacia Biblioteko**
Jardar sendis duan retleteron al la Nacia Biblioteko, referencante al nia unua letero de majo. Ni traktos la demandon pri aperigaj rajtoj de Norvega Esperantisto en la Nacia Biblioteko ricevinte respondon de la biblioteko.

**4. Esperantonia**
Invititaj de Kjell Peder Hoff (prezidanto de la Esperanto-klubo de Oslo) Peter Zilwar kaj Zsofia Korody el Esperanto-Centro de Herzberg, Germanio, pasigis semajnfinon 6-8.9.2024 en Esperantonia por elekti kaj forporti donace al la Centro librojn kaj aliajn materialojn de Esperantonia. Ni petos de Kjell Peder mallongan raporton pri la okazaĵo, kaj de Zilwar kaj Korody ni petos liston de la forprenitaj aĵoj. Marianne kontaktos Kjell Peder, Claude kontaktos Zilwar kaj Korody.

Claude planas pasigi pli ol semajnon en Oslo fine de oktobro. Kadre de sia laboro kiel redaktoro de Norvega Esperantisto li intencas studi malnovajn numerojn de NE kaj aliajn historiajn dokumentojn de NEL, kiuj troviĝas en Esperantonia. Dum Operasjon Dagsverk 31.10 Claude, nome de NEL, organizos praktikan laboron (ordigadon, registradon) por kvar junuloj en Esperantonia. Claude iniciatos kunvenon kun la redaktoro por klubanoj, kursanoj kaj aliaj osloanoj.

**5. Asisto al Douglas**
Claude intencas viziti Douglas en Hurdal fine de oktobro por provi helpi lin pri kelkaj pratikaj problemoj, interalie rilataj al la komputilo.

**6. Novaj membroj, kiel registri kaj peti kotizon?**
Dezirantoj membriĝi registriĝas en la hejmpaĝo kaj poste ricevas bonvenigan leteron de la prezidanto kaj leteron kun informoj pri pagmanieroj de la kasisto.

**7. Internacia tago de paco, Eŭropa tago de lingvoj**
Ni opinias, ke la alsenditaj materialoj de UEA pri tiuj du tagoj, interalie belaj afiŝoj, bezonas ioman tekstan redaktadon antaŭ eventuala (parta) aperigo en nia retpaĝaro.

**8. Norvega Esperantisto 4/2024**
La redaktoro jam havas multajn materialojn por Norvega Esperantisto 4/2024 kaj ne bezonas konkretan helpon pri la enhavo de la estraro.

**9. Privigligo de la retpaĝaro**
Ni provu aperigi kelkajn tekstojn de Norvega Esperanto por ke la enhavo de nia retpaĝaro estu iom ofte renovigata.

**10. Eventualaĵoj**
Claude sendos leteron al ĉiuj kluboj, petante jarraporton. La raportoj necesas por repagi al la kluboj kotizojn.

**11. Venonta estrara interkonsiliĝo** okazos merkredon la 23-an de oktobro 2024 je 20.30.

Protokolis Marianne Lund